N-o 2. 1935. 30. III.

# BULTENO

## DE ĈEĤOSLOVAKA ASOCIO ESPERANTISTA

*Redakcio kaj administracio:*
*Praha XIX., Uralské nám. 447.*
*Telefona n-ro 718-41.*

*Redaktas:*
*Dr. ST. KAMARYT*
*Dr. A. PITLÍK*

*Senpage por membroj de*
*Ĉs. Asocio Esperantista.*
*Aperas sesfoje dum la jaro.*

Invito al la

## XVI. ĝenerala kunveno de Ĉeĥoslovaka Asocio Esperantista

okazonta en Praha dimanĉon, la 14-an de aprilo 1935
je la 8-a horo matena en kafejo Louvre, Národní tř. 20.

Programo:

1. Protokolo de la lasta ĝen. kunveno.
2. Raporto pri la agado kaj pri la kaso.
3. Raporto de la revizoroj.
4. Fondo de tutŝtata centro.
5. Elektoj por vakiĝintaj lokoj komitataj.
6. Liberaj proponoj. (Sendotaj ĝis la tria tago antaŭ la kunveno.)

La komitato.

Rimarko: Laŭ § 16-a de la statuto membroj ne povantaj ĉeesti persone, povas reprezentigi sin per iu ĉeestanto. — Laŭ § 17-a la kunveno estas decidrajta, se partoprenas almenaŭ kvarono de la membroj (persone aŭ reprezente). Se ne kunvenis tiu nombro, okazas post unu horo nova kunveno, kiu estas decidrajta sen atento de la nombro.

## Agado de ĈAE en jaro 1934.

(Raporto por la XVI. ĝenerala kunveno)

Prezentante la raporton pri agado de nia komitato dum la pasinta jaro, ni petas ĉiujn samideanojn legi ĝin kun bezona atento. Ili vidos la amplekson de la propaganda laboro, kiu estas farata kaj kiu estas farinda kaj ie nepre farota. La leganto bonvolu atenti, ke areto de laborantoj estas malgranda. Ĝia ekzisto mem estas granda pruvo de vivanteco de nia movado. Ekzistas efektive areto de homoj, kiuj senprofite dediĉas ĉiun sian liberan tempon al laboro por esperanto. Ĝi estas fakto grava kaj ekstreme ĝojiga. Unu manko estas, ke tiu ĉi areto estas tro malgranda. Dua manko estas, ke ne efektiviĝis ankoraŭ fondo de tutŝtata asocio, kiu kunigus kun ni ĉiuj ankaŭ la germanajn samideanojn en nia lando. Ni raportis pri tiurilataj laboroj de la Porstatuta komisiono en Bulteno. Same raportis niaj germanaj amikoj en ilia Informilo. Pri la aktuala stato de tiu tasko raportos la prezidanto de la Porstatuta komisiono al la ĝenerala kunveno por peti decidon de ĝi. Ni petas ĉiujn niajn membrojn, ke ili partoprenu la ĝeneralan kunvenon grandnombre, kaj kiuj ne povas veni persone, ke ili reprezentigu sin laŭstatute. Ili bonvolu ankaŭ pripensi, kion ili rekomendus al la komitato kiel plej urĝaj kaj efektivigeblaj taskoj en la nova jaro.

1. **Konsisto de la komitato.** La komitato elirinta el elektoj en la ĝenerala kunveno dividis siajn funkciojn en la unua komitata kunveno 4. IV. La rezulto estas sur p. 12 de la Bulteno 1934. La divido restis sen ŝanĝo dum la jaro, la kunlaboro de ĉiuj komitatanoj estis tre bona.

2. **Komitataj kunvenoj** estis 6. Ĉiujn prezidis dro Pitlík. La kunlaboro ankaŭ de

ekster-prahaj anoj estis tre kontentiĝa. Unu kunvenon (la trian) ĉeestis persone kvar komitatanoj ne loĝantaj en Praha. Al ĉiu kunveno venis leteraj informoj kaj raportoj de prezidanto, kasisto kaj aliaj anoj. Kopioj de protokoloj estis sendataj ankaŭ tiun ĉi jaron al la komitatanoj. Plenumadis tiun taskon Fr. Staněk.

3. **Membraj kunvenoj.** Ilian taskon bone plenumas regionaj konferencoj, kiujn partoprenas plejparte niaj membroj. Estis du; en L. Bělohrad kaj en Kolín. Detala raporto estas sur p. 35 kaj 36. En L. Bělohrad ĉeestis komitatanoj Kožený kaj Beran, en Kolín 13 komitatanoj, do preskaŭ kompleta nombro de niaj komitatanoj kaj vickomitatanoj. Ankaŭ kunvenoj kunvokataj de la Ĉsl. Esperanto-Instituto en Praha estas plejparte vizitataj de niaj membroj. Tiamaniere estis al nia anaro donata ampleksa ebleco esti informata kaj informi sin reciproke pri aktualaj problemoj kaj taskoj de la movado. Al kunvenoj de REL kaj ARE ni plurfoje sendis salutojn kaj informajn leterojn. Niaj membroj ĉeestis ofte kunvenojn de GEL-anoj, same GEL-anoj kunvenojn niajn. Dr. Pontz partoprenis la konferencon en Kolín, reprezentante GEL.

4. **Administrado.** Funkcion de honora oficejestro akceptis ankaŭ tiun ĉi jaron Slavík, kvankam li ne estis komitatano. Li akceptadis korespondadon, respondadis la kurantajn demandojn, transdonadis la leterojn al koncernaj funkciuloj. Krom tio li faris preskaŭ ĉiujn cirkulerojn, dissendadis ilin, administris la Bultenon kaj ekspedadis ĝin. Pro la grandaj meritoj, kiujn li havas pri bona funkciado de nia administrado, li akceptu de ni nian sinceran dankon. La laboro estis dividita laŭ bonaj spertoj en komisionojn. Ekzistis komisionoj kun jenaj taskoj kaj estroj: Administro de membroj (Sklenčka), Financoj (Sklenčka), Gazetara servo (Ginz), Radio (Ginz), Literaturo (Hromada), Turismo (Pitlík), Lernejo (Kamaryt), Ekspozicia materialo (Šustr), Junularo (Echtner), Sciencistaj aferoj (Kamaryt), Eldonado de Bulteno (Pitlík, Kamaryt, Slavík). Kvankam tiu divido kaj malkoncentrigo de laboro principe estas tre bona kaj helpis al niaj rezultoj, tamen ĝi bezonos ian specon de nov-aranĝo. Grava manko estas, ke la estroj de komisionoj ofte estas tro unusolaj laborantoj, kaj ke unu funkciulo devas estri plurajn komisionojn. Estas nepre bezone, ke pluraj niaj membroj estu aktivaj ankaŭ administre.

La oficeja fondaĵo, kreita por ekipi la asocian oficejon, kreskis malrapide. Al la sumo montrita en nia lasta raporto Kč 647·20 alvenis en 1934 jenaj pluaj donacoj de:

| | | |
|---|---|---|
| Esperantista klubo en Bratislava | „ | 300·— |
| Esperantista klubo en L. Bělohrad | „ | 30·— |
| Esperantista klubo en Tisovec . . | „ | 25·— |
| Esperantista klubo en Lubná . . | „ | 10·— |
| La rezultanta sumo de . . . | Kč | 1012·20 |

estas tre malgranda. Ni tre dankas ĉiujn samideanajn klubojn, kiuj vidigis komprenon por urĝa bezono de nia movado, precipe al la klubo en Bratislava pro sumo konsiderinde granda. Ni uzas ankaŭ tiun ĉi okazon por peti la ceterajn grupojn, ke ili ne hezitu al plenumo de tiu ĉi nia tasko, ĉar ekipo de nia oficejo estas afero urĝa.

Ĉar la amplekso de niaj laboroj kreskas tre konsiderinde, ni provis aranĝi nin pli teknike. Ni luis depost 1-a de februaro 1935 modestan ĉambron kiel subluantoj en oficejo de samideano konsilisto Koutek kaj akceptis tre modeste salajratan oficiston samideanon Šavel. Li laboras regule ĉiutage en la oficejo kaj ni esperas, ke tiu ĉi aranĝo helpos tre en administraj taskoj de nia movado. En la ejo estas jam unu nia skribmaŝino kaj la multobliga aparato. La utileco de la Oficeja fondaĵo estas nun tre evidenta, ĉar nia oficejo bezonos meblojn kaj aparatojn.

La skribmaŝino nun laboranta en la oficejo estis ĉe sekretario Šustr, la multobliga aparato ĉe Slavík, la dua skribmaŝino estas ĉe la prezidanto.

Da leteroj kaj poŝtkartoj ni en 1934 forsendis sume 1957, da presaĵoj 3542. Interrespondaj nombroj en j. antaŭa estis 1475 kaj 3257. La kresko de la nombro de leteroj estas tre rimarkinda. Ne estas enkalkulita nombro da ekzempleroj de Bulteno.

5. **Ekspozicia materialo** (komisionestro Šustr). La materialo restis sen gravaj ŝanĝoj. Ĝi estis pruntita en Vodňany, Protivín, Horní Bojanovice. Ni povis plenumi ankaŭ petojn pri donaco de materialo, kiun ni posedas pluroble, kaj ni sendis donace po paketo al Staré Sedlo, Libochovice kaj Mukačevo. La eluzitajn kaj perditajn objektojn ni anstataŭigis per materialo donacita grandkvante de geedzoj Baroch kaj de materialo kolektita el diversaj dokumentoj ĉe la prezidanto kaj ĝen. sekretario. Pluraj sendaĵoj povis esti kompletigitaj ankaŭ per esperantaĵoj donacitaj de Esperantista Klubo en Praha kaj de la komisionestro. Ĉiuj donacitoj akceptu nian sinceran dankon.

6. **Informado pri esperantistaj entreprenoj.** La kresko de esperantista aktiveco en la pasinta jaro estas videbla ankaŭ en pli granda nombro de lokoj, el kiuj nin atingis informoj pri viveco de esperantistoj. Sed certe eĉ tiun ĉi jaron ne estas nia kroniko kompleta, kvankam ni tre persiste klopodis pri tio. Ni ankaŭ hodiaŭ donas tie ĉi nomaron de lokoj, pri kiuj ni povis raporti en la Bultena kroniko: Bakov, Banská Bystrica, Berehovo, Bratislava, Břeclav, Brno, Budyně n. O., Česká Lípa, Česká Skalice, České Budějovice, Český Krumlov, Český Těšín, Dolní Bousov, Fryštát, Hazlov, Hlubina, Hluk, Horní Litvínov, Hradec Králové, Chrastava, Jablonec n. N., Jaroměř, Jičín, Josefov, Kolín, Komárno, Kopřivnice, Košice, Kukleny, Kunovice, Kutná Hora, Lazy, Lázně Bělohrad, Lázně Luhačovice, Levice, Liberec, Litoměřice, Louny, Lubná, Mladá Boleslav, Mnichovo Hradiště, Moravská Ostrava, Mukačevo, Nové Město n. M., Nové Zámky, Nový Bohumín, Nový Jičín, Nymburk, Olomouc, Orlová, Pardubice, Parkán, Plzeň, Postoloprty, Praha, Předklášteří, Prešov, Přerov, Prostějov, Protivín, Radvanice' Rožnov p. R., Rychnov n. J., Rychnov n. Kněžnou, Slezská Ostrava, Staré Město, Sloup, Stonava, Svitavy, Teplice-Šanov, Tisovec, Třebíč, Třeboň, Třinec, Turnov, Uherské Hradiště, Úpice, Veselí n. M., Vítkovice, Vodňany, Zábřeh n. O., Záluží u M., Znojmo, Železný Brod, Žilina. Sume 85 lokoj. Enestas inter tiuj lokoj preskaŭ ĉiuj gravaj urboj, sed ne ĉiuj. Ni rekomendas tiun ĉi liston al atenta lego de ĉiuj aktivuloj. Ili vidos, kiuj lokoj mankas. Ankaŭ ili vidos, ke mankas lokoj, kie nia movado manifestiĝis per iaj iniciatoj aŭ faroj. Ili zorgu, ke en venonta jaro ankaŭ tiu loko aperu en nia kroniko. Sed ili bonvolu neforgesi nian neceson raporti koncize. Pri la jaro 1933 enhavis tia listo 66 lokojn. Estas do denove konstatebla kresko de amplekso de nia agadsfero.

7. **Varbado de membroj.** Tiu ĉi jaro estas la dua, kiam ni havas grupojn korporacie aliĝintajn. Ili pagis po membro sole 12 Kč anstataŭ 16 Kč. Nombro de tiuj grupoj kreskis. Estas en jenaj lokoj: Bakov n. Jiz., Bratislava, Brno (Klubo kaj Trakt), Hradec Králové, Holešov, Jaroměř, Kolín, Košice, Lázně Bělohrad, Lom u Mostu, Mladá Boleslav, Olomouc, Plzeň, Praha, Přerov, Prešov, Prostějov, Tisovec, Turnov, Žilina. Same kluboj en 21 lokoj kontraŭ 14 lokoj en pasinta jaro. Tio estas rezulto certe tre ĝojinda. Multon por varbado de membroj kaj ilia konservado faris la zorga administrado de membroj kaj korespondado kun la kluboj. Ankaŭ tiun ĉi jaron ni povas enskribi kreskon de membro-nombro. La kunlaboro kun Teritoria oficejo estis eminenta.

8. **Administrado de membroj** (komisionestro Sklenčka). La nombroj pri membraro en j. 1934 estis jenaj:

| | |
|---|---|
| 1 | honora membro |
| 3 | dumvivaj membroj |
| 545 | membroj pagintaj en 1932, 1933, 1934 por 1934 |
| 19 | membroj de la Studenta Sekcio pagintaj por 1934 |
| 668 | stato de membroj 1934 la 31-an de decembro 1934 |
| 505 | stato de membroj 1933 la 31-an de decembro 1933 |
| 163 | kresko t. e. 32·3%. |

Laŭloka divido de la membroj:

| | |
|---|---|
| 39 | Brno |
| 37 | Hradec Králové |
| 37 | Lázně Bělohrad |
| 37 | Olomouc |
| 106 | Praha |
| 29 | Košice |
| 26 | Kolín |
| 20 | Mladá Boleslav |
| 19 | Prešov |
| 13 | Bakov n. Jiz. |
| 12 | Žilina |
| 10 | Jaroměř |
| 10 | Turnov |
| 9 | Plzeň |
| 8 | Holešov |
| 7 | Přerov |
| 18 | po 6 en tri lokoj: Bystřice p. Host., Čes. Budějovice, Pardubice |
| 10 | po 5 en du lokoj: Komárno, Zlín |
| 16 | po 4 en kvar lokoj: Česká Skalice, Ivančice, Mor. Ostrava, Tisovec |
| 24 | po 3 en ok lokoj: Bratislava, Karvinná, Lom, Mnichovo Hradiště, Nové Zámky, Trnava, Uherské Hradiště, Vyškov |
| 40 | po 2 en dudek lokoj: Česká Lípa, Jablоné n. Orl., Jičín, Lazy, Lubná, Mukačevo, Náchod, Nymburk, Písek, Police, Pržno, Rumburk, Soběslav, Trenčín, Třinec, Trutnov, Turč. Sv. Martin, Ústí n. L., Vodňany, Zlaté Moravce |
| 122 | po 1 en 122 malsamaj lokoj de nia lando |
| 649 | en 202 diversaj lokoj. |

Studenta sekcio:

| | |
|---|---|
| 15 | en Košice |
| 4 | po 1 en Bakov n. J., Kostelec n. L., Praha |
| 19 | en 5 div. lokoj. |

El la supra listo estas vidate, ke kelkaj grupoj korporacie aliĝintaj ne pagis dum la jaro kotizojn por ĉiuj siaj membroj. Ili tion faros nur dum jaro 1935. Efektive jam la klubo el Bratislava sendis post fermo de la bilanco kotizojn por 16 membroj kaj klubo en Praha por 70 membroj. Certe venos la pagoj ankoraŭ de ceteraj ŝuldantaj kluboj. Tiuj pagoj altigos ankoraŭ la nombron de membroj en 1934. Meritas laŭdan mencion precipe kluboj en Brno, Hradec Králové kaj Olomouc, kie la membro-nombro rimarkinde kreskis. Sed kvankam la fakto de kresko de nia membraro estas tre ĝojinda, tamen la fina sumo estas tre malgranda. Ni ĉiuj devas klopodi, ke ni povu indiki tie ĉi nombrojn pli grandajn kaj imponajn. Tio estas ankaŭ unu el la kaŭzoj, kiel ni konsilas fondi baldaŭ la „unuecigitan" propagandan centron, ĉar ni esperas, ke ĝi sukcesos kolekti pli imponan nombron de membraro.

9. **Publikiga agado.** De Bulteno ni eldonis 6 numerojn en 5 kajeroj, kune 40 paĝojn kaj 4-paĝan kovrilon. Redaktis ĝin Dr. Pitlík kaj Dr. Kamaryt, responda redaktoro estis Slavík. Li ĝin ankaŭ administris kaj ekspedadis. Ricevas ĝin ĉiuj niaj anoj senpage. Ĝi kostis sume Kč 3.135'35. Numeron 5-an pagis EK Kolín, kiu akceptu nian sinceran dankon. Estis per ĝi efike propagandita la regiona kunveno en Kolín. La membroj tre ŝatas la Bultenon.

Krom ta Bulteno ni eldonis aparte: Invito al la XV. ĝen. kunveno (50 ekz.), Informaj tabuloj pri esperanto (500 ekz.), Poŝtkartoj kun map-skizo de ĈSR, dua eldono (3000 ekz.), Cirkulero de Libro-servo (500 ekz.), Slovaka ŝlosilo, dua eldono (4000 ekz.).

Slovaka-esperanta vortaro, pri kiu ni parolis lastan jaron, estas akceptita por eldono de eldonejo U NAS en Bratislava.

Estas fakto rimarkinda, ke niaj eldonaĵoj baldaŭ devas aperi en dua eldono.

Da ciklostilitaj cirkuleroj ni eldonis kune 22. (En antaŭa jaro 24.) Sumo de paĝoj estis 25. (Pasintjare 29.) El tio estas de la Gazetara servo 7 paĝoj. Sumo de dissenditaj ekz. estis 1858. La plej granda eldoncifero de unu cirkulero estis 200 ekz., la plej malgranda 30 ekz. En pasinta jaro estis tiuj nombroj 2249, 200, 33. Malkresko de la suma nombro signifas, ke ni pli uzadis Bultenon por ara disvastigo de niaj alvokoj.

10. **Kontakto kun ĉsl. oficialaj aŭtoritatoj.** La Viena konferenco prezentis okazon kaj bezonon turni sin al la oficialaj lokoj por atentigi pri invitoj, kiujn ili estis ricevintaj parte senpere, parte per aŭstria konsulejo. Rezultis el tio diversaj respondoj kaj personaj intervenoj. Fina resulto estis, ke el la respubliko estis en la konferenco oficiale reprezentitaj Fervoja ministerio, Radio-journal en Brno, Komerca ĉambro en Liberec kaj Foiro en Liberec. La rezulto estas tre bona kompare kun la ceteraj landoj. Ni dankis post la konferenco al la fervoja ministerio kaj al Radio-journal pro sendo de la delegitoj. Ankaŭ tiun ĉi jaron ni kompreneble informadis koncernajn oficialajn lokojn pri faktoj, kiuj ilin devus interesi. Pri detaloj ni raportas en koncernaj alineoj. Ministerioj fremdlanda kaj fervoja ofte informis nin pri leteroj venintaj el fremdlando kaj rilatantaj al aferoj, kiujn ni observas aŭ prilaboras. Al ministerio fervoja ni ofte tradukadis leterojn esperantlingvajn, venintajn el fremdlando.

11. **Kontakto kun nia centra organizo.** Nia prezidanto ĉeestis kiel provizora UEA-estrarano la paskan kunvenon de Genéve. En la Stockholma kongreso salutis la malferman kunvenon en nia nomo komitatano Heikenwälder. Al Viena konferenco ni sendis kiel reprezentanton dron Kamaryt. Tie li partoprenis kunsidon de ĉeestantaj UEA-komitatanoj. En detalaj leteroj kaj longaj personaj diskutoj ni kaj niaj komitatanoj klopodis konsili al kompromisa solvo de disputo pri nova gvido de UEA. En Stockholm estis nia prezidanto elektita UEA-estrarano. Post la decidoj de Stockholm ni klarigis nian vidmanieron en Bulteno sur p. 32. Intertempe la nova gvidado de UEA ekfunkciis. Ĝia tasko estas certe malfacila, sed ni kredas firme, ke la sperteco de direktoro Kreuz kaj sindono de prez. Bastien sukcesos venki la malfacilaĵojn. Grava perdo por ni kaj UEA estas, ke ĉefdelegito Sklenčka depost 1-a de januaro 1935 rezignis je funkcio ĉefdelegita kaj ke Teritoria oficejo en Hradec Králové estas likvidata. Ni bedaŭras tiun perdon de klara cerbo kaj laboremaj manoj tre kaj dankas samideanon Sklenčka en nomo de la movado tre sincere pro la servoj, kiujn li faris al UEA en nia lando kaj per ekzemplo en multaj aliaj landoj. Por ke la funkciado de UEA en nia lando ne haltiĝu, ni dissendis la pagilojn kaj anoncis nin pretaj peradi enkasigon de kotizoj. Starigo de oficejo en Praha kaj akcepto de oficisto faciligos ordon en tiu administrado. Ni esperas, ke tiu provo sukcesos kaj ke la preparata tutŝtata asocio prenos de ni tiun aranĝon jam en bona marŝo. Ni ĉiam volonte deklaras nian konvinkon

pri bezono de forta kaj bone funkcianta internacia organizo. Tial estas por ni memkomprenebla devo zorgi, ke la nombro de UEA-anoj en nia lando ne malkresku. Tie ĉi ni ripetas, ke ĉiuj korespondaĵoj por UEA povas esti sendataj al nia adreso en Praha XIX. 447, Uralské nám. — Al Lingva komitato ni sendis laŭ ĝia peto informon pri ŝtataj kaj niaj privataj ekzamenoj. La informoj jam aperis en la kompara listo pri ekzamenoj kompilita de ĝi. — Al prezidanto de UEA Bastien kaj prezidanto de la Lingva komitato Rollet de l'Ile ni gratulis ĉe okazo de iliaj jubileaj naskiĝdatoj.

12. **Kontakto kun la ceteraj naciaj societoj.** Kun GEL ni estis en konstantaj rilatoj korespondaj kaj personaj. Iliaj tri delegitoj ĉeestis nian lastan ĝeneralan kunvenon por aŭdi kaj diri opiniojn pri unueciĝo de la ambaŭ naciaj asocioj. Ili kunlaboris en la Porstatuta komisiono, pri kies laboroj ni raportis taŭgatempe en Bulteno kaj GEL en sia Informilo. Tiu ĉi publikiĝis germanan kaj esperantlingvan tekstojn de la projektata statuto. — Nian lastjaran raporton pri agado ni denove kun scio de UEA dissendis kun atentiga cirkulero al ĉiuj naciaj societoj. Respondis aŭ konfirmis ĝin la asocioj: Brita, Estona, Franca, Germana, Hungarlanda, Nederlanda, Pollanda, Sveda. Ni dankas al ĉiu respondinta asocio. Ni daŭre estas konvinkitaj, ke reciproka interŝanĝado kaj studado de tiaj raportoj multon povus helpi, ke la propagando uzu en sia lando spertojn faritajn en landoj aliaj. Studo de dokumentoj ricevitaj estis por niaj funkciuloj tre interesa. Tial ni tre miras, ke nia iniciato trovas tiom malvastan resonon. Krom tio ŝajnas al ni, ke ĉiu nacia asocio ricevinte leteron aŭ cirkuleron de la alia nacia asocio devus rigardi sia devo almenaŭ konfirmi la ricevon. Tia ĝentileco estas minimuma pruvo, ke koncerna Asocio almenaŭ ekzistas ne sole sur papero. — Ne agrable oftaj estas en nia lando vizitoj de fremdlandaj esperantistoj, pretendantaj, ke ili propagandas. Ilia agado konsistas en simpla almozpetado. Ni enskribas tiun ĉi konstaton en tiu ĉi rubriko, ĉar okazis, ke iam havis tia homo rekomendan leteron de sia nacia societo. Ni permesas al ni peti samideanajn propagandajn societojn, kiujn tio koncernas, ke ili estu pli singardemaj donante rekomendan leteron al vojaĝonta esperantisto. Laŭ nia opinio nura kono de esperanto donas al neniu rajton postuli subtenon de la ceteraj samideanoj. Ni volonte korespondos kaj donos konfidencajn sciigojn pri tiu nefacila situacio al naciaj societoj, kiuj nin petos pri tio.

13. **Lernejaj aferoj** (komisionestro Kamaryt). La lerneja administro vidigas daŭre malpli da favoro al esperanto-instruado en publikaj lernejoj. Tamen estis en tiu ĉi jaro nomita ekzamena komisaro pri esperanto ĉe germanlingva Ekzamena komisiono por popolaj kaj burĝaj lernejoj en Liberec prof. inĝ. Scholze. Sed intertempe jam aperis la nova ekzamena regularo por instruistoj de burĝaj lernejoj, en kiu esperanto mankas. La regularo ekvalidos nur en j. 1936. Al proponoj de direktoroj instrui esperanton kiel nedevigan fakon en burĝaj kaj mezaj lernejoj, vidigas la lernejaj aŭtoritatoj sintenon neafablan. Por helpi al forigo de tiu stato la komisionestro preparis detalan memorandumon, kiun li nun sendis al kelkaj aŭtoritatuloj por legi. Poste ni proponos ĝin al subskribo de iuj gravaj korporacioj aŭ aŭtoritatuloj, kiuj de tempo al tempo vidigas al ni intereson, kaj ni prezentos ĝin al ministerio. — La lecionoj de la lektorato ĉe la ĉsl. Teknika altlernejo en Praha daŭras (lektoro dr. Pitlík).

14. **Propagando ĝenerala.** Propaganda semajno aranĝata samtempe kun GEL alportis tiun ĉi jaron pli vastan resonon ol en jaroj pasintaj. Verŝajne efikas sistemeco kaj persisto, kun kiu ni nin turnas ankaŭ al la lokoj, el kiuj malofte venas iu respondo. Tamen post daŭra demandado kaj vokado oni ricevas signojn de aktiveco eĉ el loko, pri kiu oni ne estus esperinta. Niaj cirkuleroj certe kaŭzis novan aktivecon en du — tri lokoj, kie ĝi ne estus aperinta. — Pri publikaj kursoj ni ankaŭ tiun ĉi jaron faris statistikon. Laŭ la informoj, kiujn ni sukcesis kolekti en nia Bulteno, lernis en j. 1934 esp-on 1240 niaj samlandanoj en 80 kursoj por komencantoj en 58 lokoj. En j. 1933 estis 1080 komencantoj en 46 kursoj en 36 lokoj. Oni vidas, ke la meza nombro de kursanoj estas tre malgranda, do ke la kursgvidantoj dediĉas proporcie tre grandan penon al unuopaj studontoj de nia lingvo. Estis inter tiuj publikaj kursoj 5 Cseh-metodaj kursoj de italo H. Fasce en Bakov n. J., Bělohrad, Ml. Boleslav, Turnov, Žel. Brod. — Tre grandan resonon havis la radio-kurso de Kilián el Brno; ĝi signifis propagandon tre sukcesan kaj rezultis el ĝi multaj adeptoj de nia movado. La bona kompreno de organizaj demandoj de la kursgvidanto ebligis konservi adresojn de ĉiuj interesuloj kaj prilabori ilin laŭmetode. Samideano Kilián ricevu tie ĉi nian sinceran dankon pri bona faro pro-

paganda. — Ni proponas en multaj gazetoj sendi por 1 Kč koncizajn gramatikon de esp-o kaj informan presaĵon. La mendinto ricevas *ĉeĥan ŝlosilon kaj flugfolion* Jeden jazyk. Tiu ĉi iniciato, provita en fino de la jaro antaŭa, havis tiun ĉi jaron tre bonan sukceson. Ni disvastigis tiamaniere kelkajn centojn de ĉeĥa ŝlosilo kaj informis per tre bona materialo la interesantojn. Sperto montris, ke inter tiuj interesuloj, pri kiuj ni daŭre zorgas, estas tre seriozaj kandidatoj de aktiveco esperantista. *Slovaka ŝlosilo*, dua eldono korektita de P. Rosa kaj Kamaryt aperis. La *Ĉeĥa ŝlosilo* estas disvastigata de ni kun la plej ebla intenseco, por ke ĝi estu baldaŭ elĉerpita kaj povu aperi nova eldono laŭ normo de UEA. Ĉsl. E.-Instituto, kiu ĝin eldonis, disponigas ĝin al ni por tre malalta prezo; ni esprimas al ĝi pro tiu komplezo nian samideanan dankon. — Nia *adresaro* de interesantoj pri nia movado estas nun jam pli respondanta al la samtempa situacio. Ĝi ebligas al ni turni nin al multaj kaj bonaj adresoj. — Niaj *flagoj* estis uzitaj en Praha sur kafejo Louvre dum nia ĝenerala kunveno, en Kolín dum la konferenco, en L. Bělohrad dum somerrestadejo. — En ĵurnaloj ni proponis nin sendi al la interesantoj anglalingvan informon pri *Basic English*; al nemultaj petintoj ni sendis la bonan artikolon klarigan eldonitan de la Brita Asocio. Tekston de la *propaganda prelego* ni prunte sendis en 3 lokojn. — *La skriba kurso* estas verkata kaj preparata.

15. **Propagando per gazetoj** (komisionestro Ginz) estas daŭre organizata de Gazetara servo. Pri la amplekso de rezultoj donas informon la subaj ciferoj. Publikigis en jaro 1934 (rezultoj el 1933 inter krampoj):

| | | | | | | |
|---|---|---|---|---|---|---|
| 116 | (80) | gaz. en | Praha . . . | 567 | (576) | artikolojn |
| 22 | (59) | „ „ | cetera Boh. . | 506 | (354) | „ |
| 69 | (61) | „ „ | Mor.-Silezio | 771 | (310) | „ |
| 26 | (28) | „ „ | Slovakio . . | 149 | (332) | „ |
| 2 | (10) | „ | ĉsl. ekster respub. | 2 | (16) | „ |
| 305 | (238) | gazetoj | | 1996 | (1590) | artikolojn |

Suma rezulto estas tre ĝojiga, ĉar ĝi montras fortan kreskon kiel de gazetoj tiel de artikoloj represitaj. Estis streĉita forto kaj tiel atingita superpaso de la rimarkindaj ciferoj pasintjaraj. La kunlaborantoj akceptu sinceran dankon kaj peton pri elteno, por ke ni restu almenaŭ sur sama nivelo. Iuj ciferoj meritas specialan atenton kaj laŭ ili ni aranĝos nian pluan laboron. Per helpo de niaj slovakaj kunlaborantoj kaj havante novajn slovaklingvajn eldonaĵojn, ni prilaboros nun pli intense la orientan parton de la respubliko. Niajn samnacianojn en eksterlando premas ĉiam pli forte la ĉiutagaj zorgoj kaj nemulte da fortoj restas ĉe ili por nia afero. Sur la malaltaj ciferoj nunjaraj pri ĉeĥoslovakaj gazetoj en eksterlando respeguliĝas tial la malĝojaj okazintaĵoj vienaj, la vivo de ĉeĥoslovakoj en Germanio, krizo skuinta nun ankaŭ Francion kaj Usonon. Ni espereble aŭdos baldaŭ, ke estis nur paŭzo en ilia aktiveco kaj ke kun pli bonaj tempoj revenis ankaŭ eblo labori sur kampo esperanta.

16. **Propagando en fakaj rondoj.** Inter *kuracistoj* revivigos la intereson artikolo de dro Ulman en Bulteno de ĉsl. kuracistoj (Věstník čsl. lékařů). Inter *instruistaro* kaj *junularo* daŭre efikas la sisteme sendataj artikoloj de s-ino Šupichová en instruistaj kaj porinfanaj gazetoj. La tendaro en Kordíky efektive firmigis pozicion de nia movado inter la *skoltoj*. Diversaj sciigoj igas nin esperi, ke la skolta intereso pri esperanto estos daŭra kaj viva. Pri *foiroj* ni povas sole kun laŭdo mencii la rezultatojn de la foiro en Liberec, akiritan de GEL kaj ĝia prezidanto s-ro inĝ. Scholze. Estos tasko de tiu ĉi jaro klopodi, ke ankaŭ la ceteraj foiroj en nia lando uzu denove esperanton por sia propagando. Kun organizoj *katolika* kaj *laborista* ni kontaktas regule kaj raportas en Kroniko bultena pri ĉiuj iliaj entreprenoj. Ni restas membro de Konsilantaro de etikaj movadoj en Ĉeĥoslovakio. Laŭ veninta peto ni komencas zorgi pri akcepto de unuakvalita kantista societo dum ĝia koncerta vojaĝo en fremda lando. Ni kuraĝigis la eldoniston de la komercista gazeto „Export" en lia intenco pri uzo de esperanto.

17. **Propagando fremdlanden.** Laŭ peto de japanaj esp-istoj ni akceptis en Praha *japanajn sportistojn*, kiuj esprimis sian kontentecon kun nia akcepto. Ĝen. sekretario korespondis denove kun *Andersen-Muzeo* en Odense kaj kun pluraj lokoj en aliaj landoj pri *Aisberg-libro* kaj pri la *Andersen-libro*. En Bukureston ni sendis pere de komitatano Friedrich numeron de la revuo „*Malá dohoda*" (Malgranda entento) kun esperantorubriko. Ni konfirmadis zorge ĉiujn ricevitajn propagandajn presaĵojn turismajn, ideajn, komercajn.

18. **Raden-preleg-vojaĝo.** Detala raporto aperis sur p. 14. Estu tie ĉi ripetite, ke Raden parolis en 21 lokoj kaj havis 31 paroladojn, kiujn aŭskultis 9.230 homoj. Estas nekontestebla fakto, ke fremdlandano pre-

leganta en esperanto pri socia kaj ekonomia stato de sia lando estas tre grava argumento de nia propagando. Sekretario Sustr meritas nian dankon pro lia sindediĉo al tiu ĉi fako de propagando.

19. **Radio** (komisionestro Ginz). La favora sinteno de Radio-journal daŭras. Radio-stacio Brno fariĝis glora inter esperantistoj de tuta Eŭropo pro siaj Esperanto-horetoj ĉiumonataj prezentataj de grupo de profesiaj aktoroj kaj artistoj TRAKT. La resono de tiuj disaŭdigoj estas videbla el nombro de venantaj konfirmoj pri aŭskultado. Sur p. 24 ni publikigis tre interesajn nombrojn pri tio. Ankaŭ la kurso de prof. Kilian disaŭdigata el Brno havis tre vastan resonon, kiun ni povis prilabori ankaŭ organize. Meritas dankojn ĉiuj artistoj, prelegantoj kaj la kursgvidanto same kiel la administro de Radio-journal. Al ĝi ni esprimis nian dankon per rezolucio de konferenco en Kolín. Ankaŭ ĉiuj aŭskultantojn de la esperanto-programoj, precipe tiujn en fremdlando, kiuj konfirmas la aŭskultadon al la radiostacioj, ni dankas en nomo de la movado tre sincere kaj kore. Dum la jaro 1934 estis esp-o disaŭdigata el Bratislava 3 foje, el Brno 6 prelegoj, horetoj 10, kurso 30; Košice 3 foje, Moravská Ostrava 3 foje, Praha 2 foje. Ni farigis kliŝon de anoj de TRAKT (Teatro- kaj Radio-Aktoroj) kaj post ĝia enpreso sur p. 34 ni ĝin disponigis por publikigo en fremdlandaj gazetoj.

20. **Turismo** (komisionestro Dr. Pitlík). Ministerio de fervojoj eldonis propagandan turisman informilon „Ĉ e ĥ o s l o v a k i o“, bele ilustritan per reproduktaĵoj de la koloraj pentraĵoj (12 paĝoj). En oficiala helpilo, kiun eldonis la fervoja ministerio por helpi al fervojistoj en rilatoj kun fremduloj, estas ankaŭ parto en esperanto. La ambaŭ tekstojn tradukis Ginz. — E. Klubo en K o l í n eldonis ilustr. gvidlibron 16-paĝan; tekston de muzea direktoro J. Štolba tradukis Jan Janda. — Urbestraro kaj Komerca ĉambro en K o š i c e eldonis varban broŝureton en la slovaka, franca, hungara, germana, pola kaj esperanto. La esperantan tekston tradukis Friedrich. — La tria i n t e r n a c i a s o m e r r e s t a d e j o en Lázně Bělohrad aranĝita de la loka klubo havis ankaŭ tiun ĉi jaron kontentigan rezulton spite la malfacilaĵoj al internacia trafiko ĝenerale konataj. Raporto estas sur p. 35. Tiun ĉi jaron estos en julio-aŭgusto la somerrestadejo organizata jam la kvaran fojon. Daŭreco de tiu ĉi institucio signifas, ke ĝi plene respondas al bezono; ni deziras al la entreprenantoj la meritltan daŭran sukceson kaj invitas niajn kaj fremdlandajn s-dojn, kiuj volas malkare kaj agrable pasigi libertempan ripozon, ke ili petu la prospekton de la E. Klubo en L. Bělohrad. — Ankaŭ tiun ĉi jaron niaj membroj disponiĝis al fremdaj turistoj informante kaj gvidante ilin laŭ bezono kaj ebleco. — Tre sukcesa pruvo pri uzo de niaj lingvo kaj organizo estis fervojista karavano Rumanujon, gvidita de nia komitatano Friedrich; raporto pri ĝi estas sur p. 22.

21. **Stacidomaj tabuloj**. Sur p. 38 estas nomaro de stacioj, kie en jaro 1934 la tabuloj jam pendis. Estas sume 54 lokoj. La nombro estas bela sed ne kontentiga. La tabulo devus pendi en stacidomo de ĉiu loko, kie estas aktiva esperantisto. Tial ni ankaŭ en tiu ĉi raporto alvokas ĉiujn samideanojn, ke ili dediĉu iom da laboro al kolekto de sumeto 26 Kč, ĉar ĝia sendo al nia sekretariejo ebligas elpendigon de tabulo kun la loka adreso sen plua zorgo de mendinto.

22. **Informado de fremdlando pri niaj ŝtato kaj nacio**. Niaj membroj havis ofte okazon koresponde kaj persone doni al fremdlandanoj informojn pri diversaj situacioj en nia lando. Precipe partoprenintoj en konferenco Viena, kongreso Stockholma kaj UEA-komitato kaj estraro.

23. **Literaturaj aferoj** (komision-estro Hromada). Starigo de nia Libro-servo ebligis al ni pli sukcese ol ĝis nun propagandi eldonaĵojn de M o r a v i a j E s p e r a n t o - P i o n i r o j. En la lastaj jaroj ili eldonis rimarkindan vicon de tradukoj el ĉeĥoslovaka literaturo tre bone elektitajn. Precipe nuna ilia metodo eldoni beletristikaĵojn kiel aparte bindeblan aldonon al Ligilo ebligis ampleksigi ilian agadkampon. Ni klopodas helpi al ili per propagando de iliaj eldonaĵoj per nia Libro-servo. Laboro de MEP signifas gravan faron por propagandi internacie ĉeĥoslovakan literaturon per esperantaj tradukoj. — Redakto de Ĉ e ĥ o s l o v a k a A n t o l o g i o kaŭzis gravan zorgon. Kiam en julio 1934 Hromada rezignis pri redaktado, transprenis la gvidon de aferoj prof. Kožený kaj Fr. Staněk kaj de ili fine en oktobro Ginz kaj Kamaryt. Estis granda danĝero en tioma prokrasto de la laboro. Tamen la oferemo de pluraj kunlaborantoj ebligis redakti verkon, kiu estos relative tre bona, precipe laŭ elekto de la aŭtoroj. Tradukojn uzitajn liveris krom la redaktintoj jenaj gesamideanoj: V. Čech, J. V. Dolinský, V. Echtner, Dr. J. Fousek, R. Fridrich, M. Ginzová, R. Hromada, J. Hladký, J. Ježek,

V. Jukl, J. Kožený, M. Lukáš, V. Kowariková, Moraviaj Esperanto-Pioniroj, O. Sklenčka, B. Sklenčková, Dr. T. Pumpr, J. Rosa, P. Rosa, M. Staněk, O. Štěch, B. Vlčková, E. Wanitsek, A. Weiner. Ili ĉiuj ricevu nian dankon por sindono, kiun ili vidigis helpante al grava celo. Apartan dankan mencion akceptu Pavel Rosa, kiu multon helpis nin precipe en elektado kaj tradukado de verkistoj slovakaj. La Antologio estas jam finkompostata kaj versimile estos dissendata antaŭ nia jarkunveno. — Ni klopodas daŭre varbi decan nombron de AELA-anoj, ĉar ŝajnas al ni, ke eldona agado de AELA signifas eksterordinare gravan apogon de nia movado. Tial ni ankaŭ tiun ĉi jaron rekomendas al niaj membroj, ke ili restu kaj fariĝu ĝiaj anoj aŭ aĉetu unuopajn librojn. Ĉion tion prizorgas nia Libro-servo. Ni dissendis al ĉiuj niaj kunlaborantoj prospektojn de AELA kaj en la unua numero tiujara de nia Bulteno ni aldonis 4 paĝojn pri ĝiaj eldonaĵoj. Al ĉiu interesanto ni volonte sendos la prospekton kaj donos ĉiun deziratan informon.

24. **Libro-servo.** Laŭ decido de la komitata kunveno de la 10-a de julio estis fondita post paso de la somero Libro-servo de ĈAE, kies celo estas faciligi la libroaĉeton al ĉeĥoslovakaj esperantistoj kaj tiel helpi la disvastigon de esperanta literaturo en nia lando. La rezultoj de la ĝisnuna kelkmonata laboro montras, ke tiu aranĝo estis necesa. Esperantistoj ĉeĥoslovakaj kaj personoj havantaj intereson pri la lingvo turnas sin en nombro ĉiam kreskanta al la Libro-servo. Ĝi klopodas disvastigi la ĉeĥoslovakajn eldonaĵojn esp-ajn kaj estas en regulaj rilatoj kun ĉiuj grandaj esperantaj eldonejoj en eksterlando, kun AELA-Literatura Mondo, SAT ktp., ĝi estas ankaŭ ĉeĥoslovaka abonejo por Literatura Mondo, Nia Gazeto, La Pirato, La Praktiko kaj European Herald, sed ĝi prizorgas rapide esperantajn librojn ie ajn eldonitajn. Ĉiuj signoj montras, ke Libro-servo bone evoluiĝos kaj ke ĝi estos grava apogo de la organizo same kiel ĝi estas ĉe aliaj naciaj societoj. Subteno de nia Libro-servo estas tial nepra devo de la tuta membraro kaj en ĝia intereso.

25. **Sciencaj aferoj** (komisionestro Kamaryt). Komisionestro multon korespondis precipe kun s-roj Wüster en Wieselburg kaj Drezen en Moskva pri uzo de esp-o por lingva normigo precipe en elektrotekniko kaj pri Normiga konferenco en Stockholm. Ĉar prezidanto de ĉeĥoslovaka fako de Internacia elektroteknika komisiono (IEC) estas nefavora al esperanto, ni turnis nin al kvar eminentaj inĝenieroj por provi influon al agado de la komisiono. Kamaryt traktis ankaŭ persone kun ili. Certe tiu agado turnis atenton de homoj sufiĉe influaj al nia movado, kvankam pozitiva rezulto ankoraŭ ne povas esti videbla, ĉar la kunveno de komisiono, kiu traktos pri tiu problemo, estis prokrastita. Inĝ. R. Novák el Plzeň publikigis en Nová Práce artikolon pri tiu ĉi temo. Ni sendis unu ekz. de la revuo al Wüster por liaj studoj kaj klopodoj pluaj. Ĉsl. normigan societon en Praha ni informis pri letero de Biblioteko de Sovetia normiga komitato proponanta interŝanĝon de libroj kaj publikaĵoj. Al la sama biblioteko ni donacis Filozofian vortaron de Kamaryt kaj ricevis interŝanĝe du librojn de Drezen. — Laŭ propono de nia prezidanto universitata biblioteko en Bratislava aĉetis ambaŭ germanlingvajn verkojn de Wüster. — Plurfoje ni plenumis la petojn pri klarigo de diversaj lingvaj problemoj. — La reprezenton de Internacia scienca asocio esperantista por enkasigo de kotizoj transprenis de ĝisnuna delegito Kamaryt nia Libro-servo.

26. **Junularo** (komisionestro V. Echtner). La Junulara Komisiono trovis ankaŭ dum la tria jaro de sia ekzisto okazon por plenumi diversajn taskojn laŭ la elektita celo, kiu estas: veki, konservi kaj eduki intereson pri esperanto ĉe junularo, precipe lerneja. Estas registritaj 81 adresoj. Alvenis 42, foriris 36 korespondaĵoj kaj estas dissenditaj pli ol 220 diversaj aktualaj presaĵoj varbantaj por esperanto. Denove ni peris interkorespondadon, instruis letere, liveris vortarojn, librojn, broŝurojn kaj insignojn. Unu studento faris dum lerneja konkurso paroladon pri „Esperanto, ĝia signifo kaj kreinto". Lastatempe kelkaj junuloj intencas kunlabori en la Gazetara Servo.

27. Por la **Studenta sekcio** ni ne sukcesis trovi gvidanton. Ĝi do signifis sole tre malaltigitan kotizon por niaj membrojstudentoj. Studento pagas sole 6 Kč po jare kaj ricevas same la Bultenon kaj rajtas la servojn kiel la membroj ceteraj. Ni pensas, ke ni tiamaniere ebligas la partoprenon en nia Asocio al ĉiu studento kaj ke li estos ankaŭ pli poste organizita ano de la movado.

Praha, la 15-an de marto 1935.

*Komitato de Ĉeĥoslovaka Asocio Esperantista.*

*Dr. STAN. KAMARYT,* *prezidanto.* — *O. GINZ,* *ĝenerala sekretario.*

# Lokaj informoj.

*Bakov.* 20. I. amuza vespero de EK kun malgranda ekspozicio. Zorgis pri la programo Pytloun kun sia 9-jara fileto, Sedláčková, Srb, orkestro de lokaj mandolinistoj. 23. I. komenciĝis nova kurso.

*Božkov u Plzně.* 5. XIII. komenciĝis kurso kun 20 p. Aranĝas Laborista unuiĝo gimnasta.

*Bratislava.* 10. II. aranĝis Esperanto-fako de Centro de Slovakaj katolikaj skoltoj skoltan esp. kunvenon en ejo de „Charitas", kun programo: Filmo pri internacia tendaro de Ligo de skoltoj-esperantistoj apud Banská Bystrica, slovakaj kantoj en esperanto kaj amuzaj skoltaj dialogoj.

*Brno.* EK. aranĝis kurson ekde 30. XI. 34 en burĝa knaba lernejo en Židenice, partoprenis 11 personoj, kurson por progresintoj 5 p., 5. II. komenciĝis nova kurso. En ĉiuj kursoj instruas J. Vondroušek. La 25. I. okazis ĝenerala kunveno, kiu elektis jenan estraron: prez. Jaromír Hoffner, vicprez. Rud. Nečas, sekret. Jos. Vondroušek, kas. T. Borkovec, bibliotek. M. Ondráčková, asesoroj: M. Adamcová, H. Střihavka, E. Sonnenfeld, substituantoj: T. Kilian, K. Drdla. De la 2. II. ĝis 22. II. elmontra fenestro ĉe librovendisto Lošťák en Veveří ulice ekspoziciis esp. librojn. — Klubo de katolikaj esp-istoj aranĝis 6. I. en monaĥejo paroladon de J. Banzet pri vojaĝo tra Italio, Hispanio kaj Norda Afriko. La 17. I. komenciĝis kurso.

*Budyně nad Ohří.* Ekspozicio en urba domo 20. I. Kleriga komisiono urba promesas kurson, se anonciĝos interesiĝantoj.

*Bystřice nad Olší.* La partoprenintoj de kurso en Třinec antaŭ nelonge finita fondis esp. rondeton kun pli ol 50 membroj. La rondeton gvidas konata sportulo Milerský, kiu instruas en kurso kun 48 p.

*Bystřice nad Pern.* Rondo de Roveranoj ĉe la 1-a taĉmento skolta malfermis 1. III. trimonatan vesperan kurson sub gvidado de inĝ. J. Šlerka. Instruhoroj en lernejo lunde kaj vendrede.

*Česká Třebová.* 21. XI. komenciĝis kurso. Enkonduka parolado de J. Raych el Bohumín.

*České Budějovice.* La klubo La Progreso anoncis kurson en januaro. — 24. II. parolis en Žižkův dům en České Budějovice Stan. Borovka, nun soldato servanta en Kaplice, en la Dimanĉa Lernejo, t. e. diservo por geknaboj, aranĝata de la protestanta komunumo en Čes. Budějovice, al pli ol 40 geknaboj pri „Dro Zamenhof kiel unu el la bonfarintoj de la homaro".

*Děhylov.* La unuiĝo de laboristaj gimnastoj DTJ preparas kurson.

*Dolní Bousov.* Post fino de kvarmonata kurso gvidita de prof. Kožený kun pli ol 60 p. oni preparas fondon de loka grupo.

*Frýdek.* Kurso por komencantoj 1. II.; depost ĝia fino daŭras nun kurso por progresintoj. Regiona esperantista ligo havis 10. II. en hotelo „Silesia" sur ĉefa placo laborkunvenon. El 13 lokoj kunvenis 26 samideanoj kaj traktis tie sub gvido de Golachowski kaj Krysta pri la esperantista laboro en tiu parto de nia respubliko. Venonta kunveno fa 17. III. posttagmeze en Radvanice, gastejo Břenek.

*Fryštát.* Kurso kun 50 p.

*Hluk.* F. Omelka gvidas du kursojn: publikan kun 28 p., en burĝa lernejo kun 18 p.

*Horní Bojanovice.* 3. XI. komenciĝis kurso kun 15 p. Instruas Antonín Frolíšek. — 24. III. ĉe la kursfiniĝo aranĝis A. Frolíšek kun helpo de materialo liverita de ĈAE en loka popola lernejo esperanto-ekspozicio vizititan de pli ol 120 p., el tio duono lernejanoj. Li preparas nun novan kurson.

*Horní Litvínov.* Kurso depost 10. I. ĉe loka radioklubo. Instruas Ant. Slanina.

*Hrabová.* Junularo social-demokrata invitas al kurso.

*Hradec Králové.* 12. XII. Zamenhofa vespero de EK.

*Jaroměř.* Ĝen. kunveno de EK. la 7. II. en hotelo Modrá Hvězda. Post ĝenerala kunv. parolis s-ino Příhodová-Herzogová pri Stockholma UK. Ĉiuĵaŭde konversaciaj kunvenoj.

*Kaplice.* En kazerno de la 1-a bataliono de 1-a infanteria regimento gvidas laŭ lernotibro de Kilian depost 18. II. trimonatan kurson por 25 soldatoj nia membro Stan. Borovka, nun soldato ĉe la 4-a kompantio de tiu regimento. La batalionaj tagordonoj informis la soldatojn de la garnizono pri la unua kunveno de la interesiĝantoj 11. II, pri la parolado „Kial ni lernu esperanton" 12. II. kaj pri la venontaj lecionoj kun atentigo, ke soldatoj enskribitaj devas reguie viziti la kurson.

*Karlovy Vary.* Esperanto ekĝermis ĉe ĉeĥa loĝantaro de urbo. Direktoro de ŝtata burĝa lernejo Vojtěch Cyprýn gvidas kurson kun 20 gelernantoj en tiu lernejo.

*Klimkovice.* Inĝ. M. Urbaník finis kurson kun 12 p. Oni intencas fondi esp-an rondeton.

*Kolín.* 25. I. ĝen. kunv. de EK. elektis: prez. Janda, vicprez. Zindr, sekret. Václavek, komitatanoj: Weberová, Mašková, Staněk, Kroufková, Ptáčníková, Karel, revizoroj: Hermoch, Drahovzal. La klubo estas membro de AELA kaj havas bonan bibliotekon.

*Kopřivnice.* En EK. R. Zanáška instruas jam 5 monatojn laŭ Ĉe-metodo 27 komencantojn. Ankaŭ s-ino Peschke instruas malgrandan rondon.

*Košice.* Jarkunveno de la klubo estis 21. I. La klubo havis en pasinta jaro 42 membrojn, inter ili 14 studentojn. Ĉiuj estis anoj de ĈAE. En UEA estis el ili 1 MS, 4 MA, 2 MJ. La kluba biblioteko enhavas 110 volumojn. La klubo estas AELA-ano kaj akceptis en 1934 ankaŭ ĉiujn ekstervicajn eldonaĵojn, kiujn ĝi parte disvendis inter siaj membroj, parte enmetis en la bibliotekon. La klubo a-

bonas gazetojn: „Esperanto“, „Heroldo“, „Ligilo“, „Praktiko“. Krome ĝi abonas 1 ekz. de „Ligilo“ por la urba publika legejo, kiu mem abonas pluan 1 ekz. de „Heroldo“. Kunvenejo kluba estas en ejo de ŝtata industria lernejo. Dum printempo vizitadis la kunvenojn meze 19 p., dum aŭtuno 8—10 p. Kluba enspezo en 1934 estis Kč 2.082·—, elspezo Kč 2.397·—. Krom la kutima urba subvencio da 100 Kč ĝi ricevis de la urbo pluajn 200 Kč por povi sendi je siaj kostoj 3 skoltojn en la tendaron de SEL. Pri la ekstera agado oni jam siatempe raportis tie ĉi. Aldone ni enskribas ankoraŭ, ke la klubo surmetis informan tabulon, eldonitan de ĈAE, sur kafejon Astoria. La artikoletojn pri la movado la klubo anpresigas en „Slovenský Východ“. Kurso komenciĝis 22. I. Instruas J. Friedrich. — En EK. paroladis 4. III. klubano J. Ďurňák pri Slovakia paradizo. La klubo aĉetis novajn librojn kaj invitas al multenombra partopreno en kunvenoj ĉiulunde. Klubejo en industria lernejo, strato Romenského 2.

*Krnov.* Depost 2. X. kurson kun 20 p. gvidas Tandler. — 12. XII. okazis Zamenhof-festeto. Ĉeestis 42 p., muzika, prelega, deklama programo. Oni ludis belan Esperanto-marŝon, komponitan de grupano s-ro Kobliška.

*Kunovice.* Kurso kun 10 p., instruas Jan Tichoň.

*Lázně Bělohrad.* La 4. II. komenciĝis kurso. Gvidas Špůr. Ĝen. kunv. de EK la 13. II. elektis: prez. Beran, vicprez. Černý, protok. Ungerová, kas. Jireš, bibliotek. Špůr, sekret. Bechtold, reviz. Kolb, Unger, anstat. Vojtíšek, Vaňura. EK. havas apartan fakon en urba biblioteko. Ĉiujn librojn donacis delegito K. Blumauer, generalo Rambousek k. s. Okaze de la 50-jara jubileo de tiu ĉi banloko la urbo aranĝos „Ekspozicion de arto, scienco kaj literaturo“ de la 14. VII. ĝis 4. VIII. Ĝin partoprenos ankaŭ EK. per esperanta ekspozicio. La klubo (adreso: s-ro Emil Beran, přednosta stanice, Lázně Bělohrad) petas donace aŭ prunte ĉiuspecan interesan materialon. La klubo aranĝos kiel pasintjare Internacian Esperantistan Libertempejon.

*Lazy.* Kurso depost 2. XII. Instruas Josef Gabryš.

*Lhotka apud Litultovice.* En nia vilaĝo estas bona kompreno por esperanto. Dimanĉe 13. I. estis aranĝita parolado de instruisto Jan Walter: „Esperanto kaj ĝia praktika signifo“. Post parolado okazis enskribo en kurson, kiun partoprenas 20 p. kaj kiun gvidas la parolinto. Oni intencas fondi Rondeton.

*Liberec.* Kurson en Komerca akademio gvidas dro Gruber, en Industria lernejo prof. Scholze. 25. I. okazis jarkunveno de loka grupo.

*Litoměřice.* EK. kaj ĝiaj amikoj kunvenas regule en restoracio „Stadt Rumburg“. Samloke kurso por komencantoj.

*Lubná.* Rondeto de esp-istoj elektis en jarkunv. 2. II. jenajn funkciulojn: prez. J. Večeře, vicprez. J. Buben, kas. Fr. Pohorský, bibliot. J. Kopecký. La grupo disvastigas en la loko multobligitajn flugfoliojn „Esperanta movado“ kun propaganda enhavo.

*Lyžbice.* Kurson kun 21 p. gvidas Milerský.

*Mladá Boleslav.* Jarkunveno de la Klubo 29. I. El la agadraporto ni represas sole tion, pri kio ni ne raportis ankoraŭ pli frue. La Klubo esprimis kondolencon pro morto de jugoslava reĝo kaj de la franca ministro Barthou al la jugoslava kaj franca ambasadorejoj kaj al la naciaj asocioj jugoslava kaj franca. La kondolencoj estis responditaj de la jugoslava ambasoderejo kaj de la ambaŭ societoj. Ĉe la jarfino havas la klubo 24 membrojn. La biblioteko enhavas 29 librojn. Jara enspezo estis 793 Kč. Nova komitato: MUDr. K. Marek, prez., prof. J. Kožený, vicprez., K. Flek, sekretario, J. Sojková, protokolistino, K. Šolc, kasisto, J. Štros, bibliotekisto, Zd. Marková, B. Šolcová, J. Pollákové, anstataŭantoj, J. Šolc, M. Sojková, revizoroj. Nova kurso depost 16. I., gvidas prof. J. Kožený, 12 p. — EK. kune kun EK. Dolní Bousov aranĝis 6. III. solenan vesperan kunvenon en hotelo „Grand“, por soleni la 85-jaran naskiĝtagon de la prezidanto Masaryk.

*Mnichovo Hradiště.* EK Verda stelo aranĝis 3. XII. kurson.

*Moravská Ostrava.* Dum unuaj decembraj tagoj parolado de inĝ. Krajc pri esperanto en la Instruista instituto. Sekvis prova leciono de faka instruistino Adámková. 4. XII. komenciĝis kurso en Laborista Akademio. Ankaŭ Masarykova lidovýchovná škola malfermis kursojn, gvidas inĝ. Krajc kaj Slaný. 22. I. ĝen. kunv. de la Klubo de ĉeĥaj esperantistoj. Parolis inĝ. Lad. Krajc pri „La spirito Zamenhofa en la movado“. 26. I. amuza vespero. En kunveno de Klubo de ĉeĥaj esp-istoj la 26. II. en kafejo „Savoy“ parolis inĝ. Krajc pri „Neŭtraleco de esperantista movado“. — Ŝtataj ekzamenoj pri esperanto okazos verŝajne en aprilo ĉe la ekzamena komisiono de Pedagogia instituto en Slezská Ostrava. Petskriboj akceptataj ĝis 9. III. EK. donos pluajn informojn.

*Mukačevo.* Esperantista vivo en nia urbo revigliĝas. Ĉefleŭtenanto Macho gvidas kursojn porstudentajn en komerca akademio, ŝtata realgimnazio kaj hebrea gimnazio; partoprenas ĉirkaŭ 300 personoj. Ankaŭ en la suboficira lernejo kaj en la lernejo de la oficiraj aspirantoj la sama instruanto gvidas kursojn. La gekursanoj espereble fondos en nia urbo esp. grupon, al kiu aliĝos anoj de ĉiuj nacioj loĝantaj en la urbo·

*Nový Jičín.* S-ino Peschke instruas kelkajn komencantojn.

*Olešnice na Moravě.* Kun helpo de materialo liverita de ĈAE aranĝis faka instruisto Vlad. Skoupý esperantan ekspozicion por lernantoj. Eksterordinare sukcesis komuna kunveno de ĉiuj lernantoj de burĝa lernejo, dum kiu parolis paroĥestro Nedvěd kaj malnova blinda esperantisto Pohanka.

*Opava.* Rondeto de ĉeĥaj esperantistoj disiĝis, nun ekzistas en la loko nur Klubo de germanaj esperantistoj.

*Plzeň.* En germana komerca akademio komenciĝis 21. II. trimonata vespera kurso. — Laboristaj esp-istoj aranĝas en Peklo depost 2. I. kurson por progresintoj, depost 21. I. por komencantoj. Generala kunveno de Klubo de laboristaj esperantistoj. La raportoj de funkciuloj atestas pri granda laboro lastjare farita. La prezidanto de la klubo s-ro Jonák estis reelektita. Samloke 3. III. jarkunveno de la Laborista ligo esperantista en Ĉeĥoslovakio. Atentinda punkto de la traktado jarkunvena estas diskuto pri la projektita unuecigo de la laborista esp. movado nialanda. — Ekskurso de okcidentbohemaj esp-istoj al Litice. — 6. III. ne okazis konversacia kunveno, ĉar la membroj de EK ĉeestis solenan manifestacion en Placo de la Respubliko honore al 85-jara naskiĝtago de prezidanto Masaryk.

*Poruba u Orlové.* 3. II. komenciĝis kursoj por komencantoj kaj progresintoj.

*Praha.* 11. XII. Zamenhofa vespero aranĝita de ĈEI kun valora programo. Ĉeestis reprezentantoj de ĉiuj grupoj esp. en Praha. 13. XII. Klubo de esp-istoj de Malá Strana aranĝis Zamenhofan feston. 24. I. havis tiu klubo ĝen. kunv. Denove elektita prez. E. V. Müller parolis pri Maroko kaj Egiptujo. Sama estas ankaŭ la sekret. V. Rotbart, Praha XIII., Madridská 26. — EK aranĝis kursojn: 6. II. por komencantoj, 8. II. por progresintoj. 2. XII. parolis episkopo dro Ant. Eltschkner en prelega halo en monaĥejo Emauzy pri „Agado de ĉeĥoslov. misianinoj en Mahaika", kun lumbildoj. La paroladon aranĝis Pormisia fako de Ligo de katolikaj esperantistoj en Ĉeĥoslovakio. — Klubo de germanaj esperantistoj Verda stelo aranĝis kurson kun 15 p. Instruis Hocke. — En EK Praha 29. II. parolis geedzoj Echtner pri la Ĥoda regiono ĉe la okcidenta limo de Bohemio. — Kurso ĉe la esp-a rondeto Nova vivo en la ĉefepiskopa gimnazio en Bubeneč. Instruas Bohumil Čálek. — Švandovo divadlo ludis 5. III. teatraĵon „Mistero en II. etaĝo" profite al SOĈNE. — EK en Malá Strana aranĝas kursojn senpagajn en restoracio „Kasal", Zborovská, ĵaŭde je 19-a horo. — 25. III. en Verda Stelo parolado de univ. prof. dro Adalb. Liebus pri paleontologio.

*Prešov.* Kurso finiĝis 8. I. Gvidis dro Alexandr Kudlička.

*Prostějov.* EK aranĝis 13. XII. Zamenhof-feston.

*Přerov.* 7. I. komenciĝis publika kurso en la lernejo de Palacký.

*Radvanice.* En EK Nova vivo gvidas Hanzelka depost 30. X. kurson kun 20 p.

*Ropice apud Český Těšín.* 9. XII. kunveno de REL kun 61 p. — Kurso kun 15 p. gvidata de Poncza.

*Rychnov ap. Jablonec n. Nisou.* Ĝen. kunveno de la grupo Verda stelo 2. I. Nova komitato: prez. Langer (fakinstruistino, Rychnov 491), vicprez. Wabersich, sekret. Oskar Seiboth, vicsekret. Lindner, kasist. Marie Schiffner, vickasist. Zappe. La kunvenoj regule en ĉiu monato la 2-an merkredon en „Reichenauer Hof", la 4-an merkredon en Pulečný, gastejo „Weisses Rössl".

*Slezská Ostrava.* Rondeto de esperantistoj okazigas ĝen. kunvenon je 7-a horo en klubejo Na zámostí, ŝparkasa domo. Samloke senpaga kurso, komenciĝanta 23. III.

*Stará Role.* Laŭ la sciigo de la oficiala organo „Úřední list rep. čsl." ĉesis ekzisti la Esperanto-societo „Paco kaj amo".

*Staré Město ap. Uherské Hradiště.* Kurso gvidata de Fr. Ullrich finiĝis kun 30 p,

*Staré Sedlo apud Orlík nad Vltavou.* Kurson depost 6. I. gvidas Jan Hůla.

*Stonava.* 16. XII. Zamenhofa festo aranĝita de la laboristaj esperantistoj.

*Svitavy.* S-ro Johann Haupt gvidas kurson kun 30 partoprenantoj.

*Trnava.* 1. II. komenciĝis kurso trimonata.

*Třebíč.* En Komerca akademio instruas 17 lernantojn prof. Kilian.

*Třinec.* 3 kursojn kun 95 p. gvidas Liberda. El alia fonto ni havas informon, ke partoprenas 120 personoj.

*Uherské Hradiště.* Publikan kurson kun 22 p. gvidas Fr. Omelka el Hluk, en lernejo instruas 20 lernantojn H. Košínková el Kunovice. — 8. XII. amuza vespero de la Slovaka Esp. Klubo.

*Vejprty.* Publika kurso komenciĝis 19. X. kun 56 p., gvidata de Malz. Zamenhofa festo en hotelo Berbalk vizitita de 49 gesamideanoj. F-ino Schaller deklamis la esperantan himnon en originalo kaj en germana traduko, Göbelt parolis pri la vivo de Zamenhof. La kursgvidanto Malz instruanta senpage en granda kurso, estis honorita per donaco de Zamenhof-portreto. Pri esperantista laboro en Vejprty oni dum antaŭaj jaroj ne aŭdis, nun tiu loko laŭdinde distingiĝas.

*Vítkovice.* 23. I. komenciĝis kurso. — Unuiĝo de laboristaj gimnastoj malfermis 7. II. kurson, partoprenas ĉirkaŭ 45 personoj, gvidas Slaný en Domo de fakaj organizaĵoj.

*Vižňov apud Mezilesí.* Fondiĝis grupo esp-ista.

*Znojmo.* 20. I. ĝen. kunv. de Katolika klubo esperantista.

*Žilina.* Finiĝis sukcese kun 30 p. kurso komenciĝinta antaŭ 3 monatoj kaj gvidita de Lad. Goldstein. Lecionoj estis donitaj dufoje semajne en ŝtata reala lernejo. Bone estis vizitita ankaŭ kurso konversacia.

**Medicina vortaro de dro Briquet.** Grava verko de nia faka literaturo, nepre necesa por ĉiu kuracisto havanta seriozan intereson pri nia lingvo kaj utilega por ĉiu lingvo-studanto. Almenaŭ la kluboj ĝin nepre havigu por sia biblioteko. 360 paĝoj 11x15 cm, fortike bindita, afrankite por 75 Kč liveras ĈAE.

## LA LIBRO-SERVO DE ĈAE

reprezentas en Ĉeĥoslovakio la subajn gazetojn. Abonon sendu al la poŝtŝparkasa konto nro 12.371 de Svaz čs. esperantistů, Praha. La Libroservo prizorgos volonte ankaŭ abonon de ĉiu alia esperanta gazeto.

**Nia Gazeto,** monata revuo gazetforma, gvidata de profesiaj ĵurnalistoj, ilustrita. Ĉiu numero enhavas proksimume 4000 liniojn, kio egalas enhavon de libro en valoro de 15 Kč. Jare 12 numeroj por Kč 20·—. Abonebla depost iu ajn numero.

**Literatura Mondo,** luksa revuo monata de altnivela literaturo. Reprezentas digne nian lingvon sur literatura kampo. Jare 10 nroj (inter ili 2 duoblaj) por Kč 60·—. Por pluraj abonantoj samlokaj rezultas granda ŝparo: du ekz. liverataj al unu adreso kostas jare 100 Kč, tri ekz. 126 Kč ktp.

**La Pirato,** revuo de neelĉerpebla bonhumoro. La revuo liveras ĉiumonate brilan pruvon, ke inter esperantistoj ekzistas vera sprito. Por 12 nroj Kč 20·—. Abonebla de iu ajn numero.

**La Praktiko,** abunde ilustrita revuo eldonata de la Internacia Ĉe-Instituto. Multaj konkursoj kun valoraj premioj. Jare 12 nroj por Kč 40·—. Duonjara abono Kč 20·—.

**European Herald,** angla revuo semajna kun esperanta paĝo. Ĝi enhavas ankaŭ partojn francan, hispanan kaj germanan. Informas pri aktualaĵoj kaj helpas lingvostudon. Duonjara abono Kč 44·—, kvaronjara Kč 22·—. Abonebla depost iu ajn numero.

## Ricevitaj libroj.

Librojn, ĉe kiuj estas notita prezo en Kč, liveros la Libroservo de ĈAE afrankite por la notita sumo.

*Poŝkatalogo de la esperantaj por-okazaj glumarmarkoj.* Kompilis D-ro J. Takács. Eldonis Tutmonda Asocio Kolektanta. 1934. 38 pĝ. 11x16 cm. Prezo 5·20 Kč afr. Valora libreto por ĉiu kolektanto de esp-aj glumarkoj.

*Jarlibro de Tutmonda Asocio Kolektanta.* 12 pĝ. 11x16 cm. Prezo Kč 2·70. Adresaro de la TAK-membroj kun preciza indiko pri iliaj interesoj kaj emoj.

*Esperanto-hispanamerika vortaro* de Jesus Amaya. Mejiko 1934. 112 pĝ. 9x12 cm. Malgranda lernolibro kun vortaro farita laŭ Ĉefeĉa ŝlosilo, en raciigita hispana lingvo laŭ nova ortografio de Grupo Sentral de Ortografos Rebolusionarios, propagandata en Meksiko. Prezo Kč 3·80 afr.

E. K. Drezen, *Normigo de science-teknikaj konceptoj, terminoj kaj simboloj.* Moskva 1934. 108 pĝ. 14x19 cm. Prezo 2 rubloj. Ruslingva verko pri la grava temo; aŭtoro konata esperanta laboranto Drezen. Enestas franca kaj esperanta resumoj.

Alfred de Musset, *Mimi Pinson*· Tradukis M. Rethel. Eldonis Esperanto-Instituto en Venlo 1934. 44 pĝ. 15x21 cm. Prezo Kč 11·— afr. Bela rakonto de tiu fama verkisto.

S. Grenkamp-Kornfeld, *Ĉu vi aŭdis tion?* Venlo 1934. 46 pĝ. 15x20 cm. Prexo Kč 11·— afr. Kolekto de anekdotoj.

*H. J. Plehn, Sägenwörtenbuch. In fünf Sprachen: Deutsch — Englisch — Französisch — Italienisch — Esperanto. Verlag Internationaler Holzmarkt, Wien I., Tegetthoffstr. 7—8.* — En la lastaj jaroj aperas uzo de Esperanto por lingva normigo en diversaj teknikaj fakoj. Plej sisteme komencis labori en tiu ĉi fiero E. Wüster. Liaj du verkoj Internationale Sprachnormung in der Technik kaj Grundzüge der Sprachnormung in der Technik estas fundamentaj verkoj por estiĝanta kaj nepre bezona fako de normigaj tendencoj. La supre citita verketo estas de kunlaboranto de Wüster. Ĝi estas grava pro specialeco de sia amplekso kaj povas esti modelo por similaj lingvo-normigaj verkoj el aliaj fieroj. Krom la terminoj mem ĝi enhavas ankaŭ difinojn de la terminoj. Ni rekomendas akiron de tiu ĉi verketo almenaŭ al ĉiuj klubaj bibliotekoj. Ĝi kostas 12·50 Kč kaj estas ricevebla pere de nia Libro-servo.

*Dr. Szilágyi's Kurs i Esperanto.* Eldona Societo Esperanto. Stockholm 1935. 96 pĝ. 13x22 cm. 206 ilustr. Prezo 2 sv. kr. (afr. Kč 12·80). La konata hungara esperanto-instruisto prezentas al ni viglan lernolibron kun amaso da ilustraĵoj (eĉ la fama grandĉapela Adamson ripete aperas tie), multe superantan aliajn bildajn metodojn. Enestas svedlingvaj rimarkoj, sed la libro estas bone uzebla ankaŭ por alinacianoj. La libro estas agrabla surprizo kaj nepre rekomendinda por instruistoj kaj memlernantoj.

*Esperanto-võti.* Nova aranĝo kun aldonita komerca terminaro. Nova eldono de Ĉefeĉa ŝlosilo en estona lingvo aperinta en 10.000 ekz. atestas, ke estas intereso por nia lingvo en Estonio kaj ke la samideanoj tieaj scias ĝin utiligi. Similan ni jam urĝe bezonus en ĉeĥa lingvo. Prezo de la ŝlosilo eldonita de la Estona Esperanto-Asocio estas 10 estonaj cendoj.

*Marŝalo Pilsudski.* Verkis Waclaw Sieroszewski, tradukis kaj komentariis Mgr. Fil. B. Strelczyk. 54 pĝ. 14x31 cm, kun portreto de la marŝalo. Prezo ne konata. Bonega verko informanta nin pri la gvidanto de la najbara slava respubliko. Ĝi alportas multajn detalojn el lia vivo, ĝis nun apenaŭ konatajn. La traduko estas tre bona, valora laboro estas la interesaj komentarioj aldonitaj de la tradukinto.

*„L' Eŭropanismo"*, 31-paĝa broŝureto, 12x12 cm (prezo ne indikita), eldonita de UŜE-EĤO kaj verkita de ties redaktoro Josef Zaŭner, Timisoara I., Str. Lonovici 1 (Rumanio), pritraktas Eŭropon

hodiaŭan kaj morgaŭan, parolas pri multaj sensencaĵoj malfaciligantaj la vivon de eŭropano. Rekomendas esperanton, kiun ĝi nomas „lingvo eŭropa".

*Komiza Esperanto — Gazeto*, internacia revuo por ĉiufakaj gekomizoj, redaktoro Eric Fredin (adreso: Fako 34, Gunnarstorp, Svedio), hektografita. La gazeto enhavas artikolojn interesajn por ĉiu komizo. La eldonisto anoncas kvaronjaran aperadon kaj jaran abonprezon 4 resp.-kuponoj. Samprofesianoj estas invitataj al kunlaboro.

*Hotelo Rigi First*, ĉe Vierwaldstättersee, situata en la plej bela pejzaĝo svisa, 1460 metrojn super maro, eldonis bele ilustritan 8-paĝan faldprospekton esperantlingvan. Hotelo kun moderna komforto, la pensiono kostas semajne 105 sv. fr. ĉio inkludite. Ni rekomendas!

*„Export"*, faka gazeto por internacia komerco, aperanta en lingvoj germana, franca, angla kaj hispana, uzados ankaŭ esperanton. Komercistoj, abonu tiun gravan kaj seriozan gazeton kaj atentigu pri ĝi viajn eksterlandajn korespondantojn. „Export" aperas ĉe konata eldonejo C. G. Vogel, Františkovy Lázně, Ĉeĥoslovakio.

*Stellan Engholm: Al Torento.* Dua eldono. Ĉe la Eldona Societo Esperanto, Stockholm 1. 96 pĝ. 14x19 cm. Prezo: broŝ. Kĉ 8·—. Libro originale verkita, kies unua eldono jam elĉerpiĝis. Romano el kampara vivo, pri vivo de la laboristoj ĉe la uzino, iliaj interesoj, zorgoj kaj revoj. Amhistorio de du gejunuloj formas la ruĝan fadenon kaj tenas la intereson de la leganto ĝis la fino. Bela eksteraĵo, bona papero.

*Sveda Antologio.* Sub ĉefa redakto de Sam. Jansson kaj kunlaboro de pli ol 40 helpantoj. Ĉe Eld. Soc. Esperanto, Stockholm 1. I. volumo, 228 pĝ. 15x23 cm. broŝ. Kč 32·50 afrankite, tole bindita Kč 42·50 afr. La plano de la tuta verko ampleksas tri partojn: I-a parto: la tempo 1880—1920, II-a parto: la tempo ĝis 1880, III-a parto: la tempo post 1920. Nun estas preta nur unua volumo, t. e. la duono de la unua parto. Enkonduke s-ro Hj. Beckman, doktoro pri literaturo, skizas la literaturan epokon, kiun ampleksas la volumo, pritraktante la ĉefajn trajtojn de la verkistoj reprezentitaj kaj karakterizante ilin. La unua volumo prezentas la vaste konatajn aŭtorojn August Strindberg, Gustaf af Geijerstam, Victoria Benedictsson, Anne Charlotte Leffler, Verner von Heidenstam, Oscar Levertin kaj Per Hallström. La dua volumo de tin grava verko baldaŭ sekvos. Al la brila enhavo aldoniĝas unuaranga eksteraĵo. La papero por la verko estis speciale farita de sveda fabriko.

*Gvidfolio tra Košice.* La urbo kaj tiea komerca kaj industria ĉambro eldonis belan ilustritan gvidfolion okpaĝan kun tekstoj en lingvoj slovaka, franca, hungara, germana, pola kaj esperanta. Imitinda ekzemplo laŭ enhavo kaj grafika aranĝo.

*Freude durch Esperanto* de Hugo Steiner. Eldonis Das kleine Volksblatt, Wien, 96 pĝ. 14x18 cm. kartone bindita. Prezo ŝil. 2·32 = Kč 14·— afr. Nova bona lernolibro por germanoj, taŭga por kursa kaj hejma instruado. Ĝi donas ankaŭ utilajn informojn pri la movado.

*Sveda Antologio.* Dua volumo. 204 pĝ, Broŝ. 4 sv. kr. (afr. Kč 26·—), tuttole bind. sv. kr. 5·50 (afr. Kč 35·—). La unuaj du vol. kune broŝ. sv. kr. 8·50 (afr. Kč 52·20), bind. sv. kr. 10·— (afr. Kč 64·—). Antaŭ finpreso de la Bulteno venas en niajn manojn ankaŭ la volumo dua, verko same brila kiel la antaŭe menciita. Per ĝi fermiĝas la I-a parto de la Antologio. La svedoj povas esti iurilate kontentaj. Ilia lingvo estas en eksterlando, precipe en Germanio, sufiĉe vaste studata kaj grandaj verkistoj de tiu nacio famiĝis tial laŭ sia merito rapide tra la mondo. Plejparte de la verkistoj, kiujn al ni prezentas tiu ĉi volumo (Selma Lagerlöf, Pelle Molin, Ellen Key, Albert Engström, Hans Larsson, Hjalmar Söderberg, Sigfrid Siwertz k. a.) estas jam internacie rekonataj, la nuna esperanta elekto el ilia verkaro certe helpos, ke ilia famo penetru ankaŭ en la ceterajn angulojn de la mondo. La plaĉe eldonitaj libroj estos fiero de ĉiu biblioteko.

**Plena Vortaro,** verko, kiun devas posedi ĉiu praktikanto de la lingvo.

**Travivaĵoj de bona soldato Švejk** de Hašek — esperanta eltiraĵo de tiu fama verko. Eldonis SAT en Parizo. Mendu ĉe ĈAE.

## Diversaĵoj.

**Specialaj poŝtmarko-stampoj.** Por servi siajn membrojn, estas oficejo de ĈAE preta prizorgi por ili specialan oran stampon kun teksto „1850—1935 T. G. Masaryk Praha-Hrad", kiuj estas metataj sur poŝtmarkojn por festi la 85-an naskiĝtagon de nia prezidanto. Sendu tuj la necesan monon en poŝtmarkoj aŭ al la poŝtĉeka konto de ĈAE, por resendo aldonu afrankon, por eventuale dezirata stampo sur vidaĵkarto aldonu pluajn 50 helerojn Al eventuala korespondaĵo pri tiu ĉi afero — koncize! — aldonu afrankon. Validas ĝis 30. III. 1935.

**Gramofonan diskon kun la esperanta himno** liveras ĈAE afrankite por Kč 30·—. Ni varme rekomendas al membroj kaj precipe al la kluboj akiron de ĉi tiu bonega disko, surkantita de la fama Bakule-ĥoro.

**Stampilon kun via adreso** vi devas havi, se vi korespondas. Ni ĝin liveras al niaj membroj afrankite por Kč 16·— (50x13 mm, maksimume 3 linioj). Mendon kun pago sendu al ĈAE.

**Helpo petata el Japanio.** En Kansai-distrikto, la 21-an de septembro 1934 faris tifono kaj inundo grandegan malutilon. Japanio estas malproksime kaj ni ĉi tie apenaŭ povas havi imagon

pri la katastrofo. Por helpi al la homoj bezonanta urĝe helpon, oni organizas monkolektadon kaj dissendas esperantajn cirkulerojn en tutan mondon en la espero, ke ne malaperis ankoraŭ komuna sento, kiu klopodas savi ĉiun homfraton. Kiu povas, helpu kaj sendu siajn donacojn rekte al Osaka Mainichi Shimbun, 2, Doojima, Kitaku, Osaka (Japanio).

**Gesamideanoj, helpu!** En nomo de 55 malriĉaj infanoj de ĉi tiea lernejo, en montara malriĉa regiono, kie la lernejo devas aĉetadi al infanoj eĉ malgrandan plumon, mi vin petegas: Dum kunvenoj kunkolektadu pli malnovan vestaĵon, monon kaj sendu al adreso: Správa štátnej ludovej školy v Kysúci, p. p. Lom nad Rimavicou, okres Rim. Sobota. Se vi vidus ĉi tiean mankon, nenia ofero estus por via malfacila! Korajn antaŭdankojn! — Ni volonte publikigas ĉi tiun alvokon, senditan al ni de la direktoro de tiu lernejo, nia membro.

**Ĉeĥaj versoj pri esperanto.** Kiel eluzi belan kutimon por semi semon de idealo en korojn de gejunuloj? Estas kutimo inter gelernantoj, antaŭmeti al siaj geinstruistoj memorlibreton, por ke ili enskribu en ĝin instrukciojn por plua vivo, maksimojn, bondezirojn k. s. Tiun ĉi kutimon oni povas uzi por instigi gejunulojn, ke ili lernu esperanton. Malgranda verseto tiucelen povas iam estonte ekĝermi kaj doni frukton benatan. Ĉu vi povas verki tian ĉeĥlingvan verseton aŭ ĉu vi konas ian similan? Se jes, skribu afable al s-anino Sophie Ĉipera, Plzeň III., Žižkova 52.

---

# Radio.

15. I. *Moravská Ostrava* 22·30—22·45. Paroladon de inĝ. Fr. Fähnrich, ĉefa inspektoro de la ferfabrikoj en Vítkovice pri „Homoj kaj maŝinoj" tradukis kaj prezentis O. Gadula.

30. I. *Mor. Ostrava.* 22·30—22·45. Parolado de inĝ. Lad. Krajc: Kiel servas esperanto al Ĉeĥoslovaka respubliko.

6. II. *Praha, Brno, Mor. Ostrava.* 22·15—23. Espa horeto. Parolado de prof. J. Tvrdý: La ideo de demokratio ĉe Masaryk, Šamla: leterkesto, partoj el la dramoj Anĝeloj inter ni de Fr. Langer kaj La sorĉisto de Menlo de E. Konrád. Ario de J. B. Foerster el Eva. Ot. Jeremiáš: ario el Fratoj Karamazov.

13. II. *Moravská Ostrava* 22·30—22·45. Parolado: Vintraj sportoj en Ĉeĥoslovaka respubliko.

20. II. *Moravská Ostrava* 22·30—22·45. La Ĉeĥoslovaka respubliko, la lando de avantaĝa aĉeto.

6. III. Esp. horeto el *Brno.*

3. IV. Esp. horeto el *Brno* — „Vendita fianĉino" de Bedřich Smetana en esp-a traduko.

---

## Stacidomaj tabuloj

Malrapide, sed tamen multiĝas la stacioj ornamitaj per nia tabulo. Al la nomaro publikigita en nro 6-1934 de nia Bulteno aldoniĝas: Kopřivnice, Moravská Ostrava-Přívoz, Turnov kaj Zbečno.

Zorgu, ke ne manku via stacio kaj anoncu vin ĉe ni baldaŭ. Detalojn serĉu en Bulteno aŭ postulu de ni informan presaĵon.

Ni akcentis jam, ke grava laŭ propaganda vidpunkto estas la unuformeco de la tabuloj. La samaspektaj tabuloj ĉie kun sama granda verda stelo enpenetras en la menson de la vojaĝanta publiko kaj ne permesas forgeson pri nia vivo. En kelkaj lokoj la kluboj jam antaŭe havis sian tabulon de alia grandeco en la stacidomo kaj ne ŝatas ĝin nun forigi. Oni pagas por ĝi ie sufiĉe altan lupagon. Kvankam ni restas ĉe nia supre dirita konvinko, ni deziras helpi tiujn klubojn kaj petas informon, kia tabulo estas en ilia stacidomo (preciza grandeco) kaj kiom ili pagas por ĝi jare. Se la sumo estas alta, ni aranĝos, ke la tabulo estu konsiderata oficiala propagando farata de ĈAE kaj ke la lupago estu grave malaltigita.

---

## Kotizoj de ĈAE kaj de UEA.

Ni petas la samideanojn, kiuj ne atentis nian alvokon en la pasinta numero kaj ne pagis al ni ankoraŭ la kotizon por 1935 aŭ ŝuldas ankoraŭ tiun por 1934, ke ili afable nun plenumu tiun devon.

**Kotizo de ĈAE** estas **Kč 16·—**, kiun sumon sendu al nia poŝtĉeka konto nro 9602. Se vi formetis la pagilon, aĉetu por 5 hel. en la poŝtoficejo t. n. blanko-pagilon.

Ni atentigas denove, ke ni akceptas ankaŭ kotizojn por UEA. Ili estas por la j. 1935

Kč 25·— por MJ (Membro kun Jarlibro)
Kč 60·— por MA (Membro kun Jarlibro kaj gazeto Esperanto)
Kč 160·— por MS (Membro kun Jarlibro kaj gazeto Esperanto kaj kun valoraj libraj premioj).

Ni atentigas, ke MA-kotizo ne estas plu Kč 50·—, sed nunjare Kč 60·—. Kiu pagis malpli multe, bonvolu al ni sendi nun la reston. Premioj por frupago ne estas en 1934, sed estas samideana devo pagi rapide. UEA-kotizojn bv. sendi al ni per sama pagilo ne deprenante ian procentaĵon. La procentaĵon por Delegitoj fiksis UEA por kompensi iliajn elspezojn devenantaj el multekosta korespondado al C. O. en Ĝenevo. Tiuj elspezoj ne estas en Ĉeĥoslovakio, kie nia oficejo aranĝas ĉion necesan.

---

# LIBRO-SERVO de ĈAE.

## *Lernolibroj:* Kč

Bouška H. K., *Škola esperanta.* 160 pĝ. 15x22 31·—
Eiselt Josef, *Esperanto pro každého,* 76 pĝ. 21·—
Kilian, *Esperanto.* Mluvnice, čítanka, 2 slovníky. 110 pĝ. 12x19 . . . . . . . . . . 6·60
*Klíč esperanta.* 24 pĝ. 7x11 . . . . . . —·60
*Kl'íč esperanta,* 32 pĝ. 7x11 . . . . . . 1·20
Šilha dro Ant., *Učebnice esperanta.* 96 pĝ. 12x20 10·—
Šupichová, *Esperanto,* mluvnice a cvičebnice. 4-a eld., 128 pĝ. . . . . . . . . . 10·80
Šupichová, *Kniha česko-esperantské konversace.* 124 pĝ. 12x19 . . . . . . . . 3·80
Šupichová, *Legu kaj parolu!* Esperanta lego-libro. 212 pĝ. 12x19 . . . . . . . 6·20
Šupichová, *Malá učebnice esperanta.* 72 pĝ. 11x12 2·60
Žďárský-Procházka, *Učebnice esperanta.* 352 pĝ. 11·5x16 . . . . . . . . . 21·—

## *Vortaroj:*

Berger L., *Česko-esperantský slovníček.* 96 pĝ. 11 x 17 . . . . . . . . . . . . . . . . . . 14·—
Čánský-Riedl, *Slovník esperantsko-český,* 310 pĝ. 11·5x16 . . . . . . . . . 20·80
Filip, *Velký slovník esperantsko-český,* 410 pĝ. 11·5x16 . . . . . . . . . . . . 29·20
Ginz, *Radiovortaro kvinlingva.* 218 pĝ. 12x15 . 5·50
Hromada-Petr, *Slovníček esperantsko-český.* Pli ol 6000 vortoj. 108 pĝ. 10x14 . . . 6·80
Kamaryt, *Filozofia vortaro.* 170 pĝ. 13x18 . . 29·—
Kühnl-Procházka, *Slovník česko-esperantský.* (25.000 vort.) 284 pĝ. 12x18 . . . . 26·50
Plehn, *Vortaro de manaj segiloj kvinlingva.* 32 pĝ. 14x21 . . . . . . . . . . 12·50
*Plena vortaro de esperanto.* 2-a eld. 511 pĝ. 15x20. Bindita . . . . . . . . . 111·—

## *Verkoj pri lingvo kaj movado:*

*BES-Adresaro* de esperantistoj el ĉiuj landoj. 11-a eld. 108 pĝ. 11x14·5 . . . . . . 8·20
*Bulteno de ĈAE* 1933, 48 pĝ. 18x27 bindita 11·—
Collinson, *Esperanto a jeho kritikové.* 24 pĝ. 2·—
Kamaryt, *Mezinárodní jazyk.* 74 pĝ. 14x19 . 8·60
Lanti, *Dělnický esperantismus.* 36 pĝ. 13x18 . 2·70
*Svaz národů o esperantu.* Zpráva o esperantu, již vypracoval jeho gen. sekretariát. 48 pĝ. 12x17·5 . . . . . . . . . . . 5·—
Takács, *Katalogo de esperanto-gazetoj.* 168 pĝ. 11x15 . . . . . . . . . . . . 15·60

## *Literaturo:*

Filip, *Kantareto.* Zpěvník čsl. nár. písní přelož. do esperanta. 62 pĝ. 10x17 . . . . . . 4·20
Herben dro Jan, *Malriĉa knabo, kiu gloriĝis.* Biografio de T. G. Masaryk. 126 pĝ. 14x19 17·—
Herrmann Ignát, *Fokso—Nukso.* 68 pĝ. 14x19. Bindita . . . . . . . . . . . . 13·80
*Internaciaj konvencioj pri fervojaj trafikoj.* 254 pĝ. 20x16 . . . . . . . . . 24·40
Kamaryt dro Stanislav, *Unua kristana slovaka princo.* 14 pĝ. 12x15 . . . . . . . 1·—
Mahen Jiří, *La koboldo Ondra.* 46 pĝ. 11x14 . 3·20
Milič-Šamla, *Per poŝtmarko kaj Esperanto ekkonu la mondon.* 10 pĝ. 15x21 . . . . 1·70
Rákosi V., *For la viandon.* Bonhumoraĵoj. 46 pĝ. 10x16 . . . . . . . . . . 5·20
Sumín Jiří—Růžena Svobodová, *Du noveloj.* 84 pĝ. 14x19. Bindita . . . . . . . . 13·80
Ulrich F., *Skizoj el Esperantujo.* 32 pĝ. 11·5x15 5·20
Vladyka Ladislav, *Mi en li.* 194 pĝ. 14x18. Bind. 27·20
Vrchlický Jar., *Nokto en Karlův Týn.* 72 pĝ. 14x21 . . . . . . . . . . . . 6·40
Welzl Jan, *Tridek jaroj en la ora nordo.* 318 pĝ. 14x19. Bind. . . . . . . . . . . 40·80

Ĉiuj eldonaĵoj de Literatura Mondo kaj de AELA.

*

*Gvidfolio de Praha.* Ilustr. 12 pĝ. 11x25. . . 1·20
*Gvidlibro tra Kolín,* 16 pĝ. 12x16 . . . . 1·—
*Ilustr. poŝtkartoj de Praha* kun esp. teksto. 6 diversaj . . . . . . . . . . . 3·60
*Poŝtkartoj kun mapo de Ĉeĥoslovakio* 100 ekz. Kč 15·—
*Poŝtkartoj* kun verda stelo, terglobo kaj sur-skribo „Esperanto" aŭ kun propaganda teksto en 8 naciaj lingvoj 25 ekz. Kč 3·—, 50 ekz. Kč 5·—, 100 ekz. Kč 10·—

*

*Literatura Mondo.* Ĉeĥoslovaka numero . . 6·—
„ „ Kelkaj ekzempleroj sur kreta papero „ 8·—
„ „ abono 10 nroj jare . . . 60·—
*La Pirato.* Monata. 12 n-roj . . . . . . 20·—
*Nia Gazeto.* Monata. 12 n-roj . . . . . 20·—
*La Praktiko,* jare . . . . . . . . . . 40·—

*

*Gramofona disko* kun „La Espero" kantita de Bakule-ĥoro . . . . . . . . . . 30·—

*

*Esperantaj insignoj* de div. specoj. Postulu specialan liston.
*Stampilo* kun via adreso 50x13 mm . . . 16·—

**Afranko enkalkulita, por registrita sendo aldonu Kč 2·—.**

**Pagu al la poŝtĉeka kto „Svaz čs. esperantistů, Praha" n-ro 12.371.**

Prošel jste učebnici esperanta
Chcete základy svých vědomostí prohloubiti
Potřebujete cvičebnici s mnoha články ?

Doporučujeme Vám knihu:

**UČEBNICE ESPERANTA**

**OD PROF. Dra A. ŠILHY.**

Schválena ministerstvem školství. 96 stran, cena 10·60 Kč vyplac. Při 5 výt. sleva. Objednejte bianco-složenkou, kterou vyplňte číslem 34.271 a jménem:
Časopis La Progreso, Praha VII.

**Vděčnost**

svých zahraničních přátel esperantských

získáte si darováním některého překladu z české literatury:

Ĉeĥoslovaka numero de Literatura Mondo 6·— Kč
Čapek-Chod, Noveloj, 86 str., váz. . . 13·— Kč
Svobodová R., Du noveloj, 84 st.. váz. 13·— Kč
Herrmann I., Fokso-Nukso, 68 str., brož. 8·— Kč
Dr. J. Herben, Malriĉa knabo, kiu gloriĝis. Biografio de T. G. Masaryk. 136 stran, brož. . . . . . . . . . . . 16·— Kč
Vrchlický, Nokto en Karlův Týn, 72 str., brož. . . . . . . . . . . . . 6·40 Kč
Hašek, La travivaĵoj de la brava soldato Švejk dum la mondmilito, 154 str. brož. 20·— Kč, váz. . . . . . . . . 28·— Kč
Vladyka L., Mi en li. Kriminalromano, 194 str., váz. . . . . . . . . . . . 26·— Kč
Welzl J., Tridek jarojn en la ora nordo. Tre interesa libro. 318 stran, váz. . 39·— Kč

Za předem zaslanou částku obstará:
LIBRO-SERVO de ĈAE, PRAHA.
Účet pošt. spoř. 12.371.

**NIA GAZETO**

la vigla gazeto esperantista, eldonata en libera Francio. Aperas monate kun riĉa enhavo. Ilustrita. Abonon por 12 n-roj 20 Kč akceptas la ĉeĥoslovaka reprezentanto de N. G.:
LIBRO-SERVO DE ĈAE.

**HOTELO RIGI FIRST** Rigi ĉe Vierwaldstättersee — Svislando. — La sunplena sporthotelo super la nebulo. Plej moderna komforto por malalta prezo. Kompleta pensiono 105 frankojn semajne. Plej taŭga regiono por ĉiuj vintraj sportoj. Petu esperantan prospekton.

**JUVELIMITAĴOJ:**

broĉoj, braceletoj, kolieroj, butonoj, ĉiuspecaj vitraĵoj, malmultekoste

**Adolf Novotný,** vitropremisto
Těpeře 61, p. Železný Brod.

NOVAĴO: Esperantaj insignoj el vitro, pingloj por sinjoroj po 1 Kč, por samideaninoj verda stelo kun kolĉeneto 5 Kč.

**Kosmetika preparaĵo SATO**

speciala vizaĝkremo farita laŭ malnova armena recepto. Mirinde efikas sur la haŭton, farante ĝin brile blanka. Forigas komplete lentugojn.
Fabrikas armena samideano

**Georgo Ter-Akopov,**
**Praha VIII.,** Poděbradova,
membro de E. K. Praha, de ĈAE, de UEA.

Všem svým známým dejte osmistr. leták

**Jeden jazyk pro celý svět,**

který podrobně informuje o dnešním stavu hnutí a možnostech praktického použití esperanta. 100 výt. 20 Kč u Svazu.

**ENCIKLOPEDIO DE ESPERANTO,**

libro, kiun devas posedi ĉiu aktiva esperantisto — VERKOJ DE KALOCSAY, nia poeto de tutmonda formato — ORIGINALAJ VERKOJ KAJ TRADUKOJ de niaj plej bonaj verkistoj — LITERATURA MONDO, luksa revuo de altnivela literaturo — LINGVO-LIBRO, gazeto, kiu fidele informas pri kresko de nia literaturo
— ĈEĤOSLOVAKA ANTOLOGIO —
nun jam finpresata.

Jen la eldonaĵoj de AELA — LITERATURA MONDO, nia plej granda eldonejo. Postulu ilustritan katalogon de ĈAE.

Vychází 6krát do roka. — Vydavatel: Svaz čsl. esperantistů v Praze XIX., Uralské n. 447. — Zodpovědný redaktor Fr. Slavík. – Tiskne A. Pražák, Jablonné n. O. – Novinová sazba povolena Ředitelstvím pošt a telegrafů v Praze, č. 102.047-VII-1933 – Podací úřad Praha 45.